

PAROLOJ DE  
LA ĈEFO SEATTLE

ILLUSTRIS PHILIP RIVIERE

*fratoj eble  
nu  
estas...*

UTOVIE

En 1854, la prezidento de USONO  
sciigis al la indianoj DUWAMISH  
(DUÛAMIŜ)  
de la nordokcidentaj ebenaĵoj,  
ke la registaro proponis  
aĉeti ilian landon.

La indianoj,  
unuaj loĝantoj de Ameriko,  
ĉiam harmonie vivinte  
kun la naturo  
neniam kapablis kontraŭstari  
al tiu "konkero".

La tribestro de la DUWAMISH,  
responde al tiu aĉetpropono  
farita de la registaro,  
eldiris paroladon.

Hodiaŭ, daŭre,  
tiu respondo venas al ni,  
kiel leciono  
pri ekologio kaj vivo,  
tio estas pri saĝeco.

Do, jen la...

**PAROLOJ DE  
LA CEFO SEATTLE**

(Siatl)

**ilustris Philip Rivière**



La Granda Blanka Ĉefo, en Washington (ŭaŝington), salutas nin amike kaj bonvole. Tio, de li, estas ĝentila, ĉar ni scias, ke li nian amikecon ne multe bezonas tial ke lia popolo estas multnombra. Ili estas tiom kiom la herboj kiuj kovras la vastan herbejon dum nia popolo estas malmulta kaj similas al disĵetitaj arboj de ebenaĵo balaita de ŝtormo.

La Granda, kaj mi supozas, ankaŭ bonanima, Blanka Ĉefo sciigas al ni, ke li volas aĉeti nian landon, sed lasi al ni rezervejon por tie vivi sufiĉe vaste.

Tiu ĉi propono ŝajnas justa, eĉ grandanima, ĉar la Ruĝa Homo ne plu havas rajtojn elementeblajn fronte al la fusiloj de la Blanka Homo.





Tamen, kiel povas vi aĉeti aŭ vendi la ĉielon, la tervarmon ?

Tiu ideo ŝajnas al ni stranga. Se ni ne posedas la freŝecon de la aero kaj la brilspeguladon de la akvo, kiel povas vi ilin aĉeti ?

Ĉiu peco de tiu lando estas sanktega por mia popolo. Ĉiu brila arbopinglo, ĉiu sabla riverbordo, ĉiu ŝirpeco de brumo en la malhelaj arbaroj, ĉiu maldensejo kaj ĉiu zumado estas sanktega, memore kaj sperte, por mia popolo.

La mortintoj de la Blankaj Homoj forgesas sian naskiĝlandon, tuj post kiam ili trapasas la portalon de la tombo. Ili vagas en la ĉiela paradizo, inter la steloj; baldaŭ ili estas forgesitaj kaj neniam revenas.

Niaj mortintoj neniam forgesas tiun ĉi belegan teron, kiu naskis ilin, ĉar ĝi estas la patrino de la Ruĝa Homo. Ili daŭre amas ĝiajn riverojn kiuj serpentas en izolaj valoj, ĝiajn imponajn montojn kaj ili ĉiam sopiras tenegege pri la vivantoj korsolecaj. Ili ofte revenas por viziti kaj konsoli ilin.

Ni estas parto de la tero kaj ĝi estas parto de ni.






La bonodoraj floroj estas niaj fratinoj; la cervo, ĉevalo, granda aglo estas niaj fratoj. La rokaj krestoj, la varmo de la poneo kaj la homo : ĉiuj apartenas al la sama familio.

Tial, kiam la Granda Ĉefo en Washington sciigas, ke li volas aĉeti nian landon, tiam li petas multon de ni.

La Granda Ĉefo sciigas, ke li rezervos lokon por ke ni vivu komforte inter ni. Li estos nia patro kaj ni estos liaj infanoj. Do, ni konsideros vian oferton por aĉeti nian landon, sed tio ne estas facila. Ĉar sanktega estas tiu ĉi lando por ni.


La scintilanta akvo, kiu fluas en rojojn kaj riverojn, estas ne nur akvo sed ankaŭ sango de niaj antaŭuloj.

Se ni vendas al vi nian landon, vi devas rememorigi al vi ke ĝi estas sanktega, kaj vi devos instrui al viaj infanoj ke ĝi estas sanktega kaj ke ĉiu spektra brilo en la klara akvo de la lagoj elvokas eventojn kaj memorojn pri la vivo de mia popolo. La murmuro de la akvo estas la voĉo de la patro de mia patro.



La riveroj estas niaj fratinoj : ili sensoifigas nin, portas niajn kanuojn kaj nutras niajn infanojn.

Se ni vendas al vi nian landon, vi devas rememorigi al vi kaj instrui al viaj infanoj, ke la riveroj estas niaj fratinoj, ankaŭ la viaj. Tiam vi devos montri al la riveroj la tenerecon saman, kian vi montras al fratino via.



Ni scias ke la Blanka Homo ne komprenas niajn morojn.

Laù li, terparcelo similas al alia çar li estas alilandano, kiu alvenas dumnokte kaj elprenas el la tero kion li bezonas.

La tero estas ne lia fratino sed lia malamikino, tial, post kiam li konkeris kaj elçerpis ĝin, li foren iras.

Eç la tombon de siaj prapatroj li forlasas, kaj tio ne turmentas lin.


La tombo de liaj prapatroj kaj la heredaĵo de liaj infanoj falas en la forgesojn.

Li traktas sian patrinon, la tero, kaj sian fraton, la çielo, kiel aĵojn açetotajn, rabotajn, vendotajn, kvazaù ili estus ŝafoj aù brilaj perloj.

Lia apetito voros la teron, kaj postlasos nur dezerton.

Niaj moroj ne similas la viajn.





Vidi viajn urbojn dolorigas la okulojn de la Ruĝa Homo. Sed eble estas ĉar la Ruĝa Homo estas sovaĝulo kaj ne komprenas.

Ne troviĝas pacaj lokoj en urboj de la Blanka Homo. Nenie aŭdiĝas la malvolviĝantaj folioj aŭ la susurado de insektajflugiloj printempe. Sed eblas, ke mi, kiel sovaĝulo, ne komprenas.

La bruego, ŝajne, nur insultas la orelojn. Kia intereso estas en la vivo se la homo ne povas aŭdi la krion de soleca kaprimulgo aŭ la noktajn kvakadojn de ranoj ĉirkaŭ lageto?

Mi estas Ruĝa Homo kaj ne komprenas.



La indiano preferas la mildan sonon de la vento ekĵetanta sin kvazaŭ sago, ĉe la supraĵo de laĝeto, kaj la odoron de la vento, lavita de la tagmeza pluvo aŭ parfumita de la pinio.

La aero estas altvalora por la Ruĝa Homo, ĉar ĉiuj aĵoj kunhavas la saman blovon : la besto, la homo, ĉiuj devenas de la sama spiro.

La aeron, kiun li spiras, la Blanka Homo ŝajne ne rimarkas : kvazaŭ lia elspiro daŭrus plurajn tagojn, li estas nesensiva al fetoro.

Sed, se ni vendas al vi nian landon, rememorigu ke estas altvalora por ni la aero kies spirito estas en ĉio kion ĝi vivigas.







La vento kiu donis al nia avo lian unuan spiron, ankaŭ lian lastan elspiron ricevis.

Tial, se ni vendas nian landon al vi, vi devos, ĝin aparte gardi kaj konsideri ĝin sanktega, kiel lokon kie eĉ la Blanka Homo povas iri por gustumi la venton, dolĉigita de la kampofloroj.

Do, ni konsideros vian aĉetproponon pri nia lando. Sed se ni decidus konsenti pri ĝi, mi antaŭmetus unu kondiĉon: ke la Blanka Homo devontigu sin trakti la bestojn de tiu ĉi lando same kiel li traktas siajn fratojn.

Mi estas sovaĝulo, tial mi ne konas alian vivmanieron.

Mi vidis milon da bizonoj putriĝantaj sur la herbejo, forlasitaj de la Blanka Homo, kiu pafis ilin el veturanta trajno. Mi estas sovaĝulo, kaj mi ne komprenas kiel la ferĉevalo fumanta povas esti pli grava ol la bizono, kiun ni, indianoj, mortigas nur por vivteni nin.

Kio estas la Homo sen bestoj ?



Se ĉiuj bestoj malaperus, la homo mortus pro granda soleco de la spirito. Kio okazas al bestoj, tio baldaŭ okazos al la homo.

Ĉiuj aĵoj rilatas inter si.

Vi devas instrui al viaj infanoj ke la grundo kiun ili surpaŝas konsistas el cindroj de niaj prapatroj. Por ke ili respektu la teron, diru al viaj infanoj, ke ĝi estas plivalorigita de la vivoj de nia raso.

Instruu al viaj infanoj kion ni ĉiam instruis al la niaj : la tero estas nia patrino. Ĉio kio okazas al la tero, tio okazas al la idoj de la tero.

Se la homoj kraĉas sur la grundon, ili kracas sur sin mem.



Ni scias almenaŭ tion ĉi : la tero ne apartenas al la homo; la homo apartenas al la tero. Tion ni scias.


Ĉiuj aĵoj rilatas inter si, kiel la sango kiu interligas samfamilianojn.

Ĉiuj aĵoj rilatas inter si, tial, ĉio kio okazas al la tero, tio okazas al la idoj de la tero.

Ne la homo teksis la vefton de la vivo : ĝi estas nur fadeno de la vivo. Ĉio kion ĝi faras al la vefto, ĝi faras al si mem.

Eĉ la Blanka Homo kies Dio promenas kun ĝi, kaj amike parolas al ĝi, ne povas liberiĝi de la komuna sorto.





Finfine, fratoj eble ni estas. Tion diros al ni la estonto.

Ion ni scias, kion la Blanka Homo eble iam malkovros, tio estas ke nia Dio estas sama komuna Dio. Eble vi pensas ke vi posedas Ĝin kiel vi volas posedi nian landon, sed vi ne povas. Ĝi estas la Dio de la Homo kaj Ĝia kompato estas egala por la Homo, ĉu Ruĝa, ĉu Blanka.



Tiu ĉi tero estas altavalora por Ĝi, tial, malutili al la tero, tio estas gravega malestimo al ĝia kreinto.

Ankaŭ la Blankuloj malaperos. Eble plu frue ol ĉiuj aliaj triboj.

Poluciu vian liton, tiel vi sufokiĝos dumnokte en viaj propraj forĵetaĵoj.

Sed mortigante, vi lumos brile, ardantaj de la forto Dia kiu alportis vin ĝis tiu ĉi lando kaj kiu, por plenumi iun specialan planon, igis vin superregi tiun ĉi landon kaj la Ruĝan Homon.

Tiu destino estas mistero por ni, ĉar ni ne komprenas.







Kiam ĉiuj bizonoj estos masakritaj, ĉiuj sovaĝaj ĉevaloj malsovaĝigitaj, ĉiuj sekretaj anguloj de la arbaro ŝargitaj de la odoro de multaj homoj, kaj kiam la vido al florkovritaj montetoj estos malpurigita de parolantaj draĵoj...

Tiam, kie estos la arbardensejoj ?

Malaperigitaj.

Kie estos la aglo ?

Malaperigita.

Kaj tiu malaperado signos la finon de la vivo kaj la ekon de la postvivado.



Kun helpo de niaj amikoj  
DAVID SIMINGTON, en USONO,  
kaj JACQUES HARANG, en Francio,  
ni rekreis kiel eble plej fidele  
LA PAROLOJ DE LA ĈEFO SEATTLE  
kaj la kovrililustraĵon depruntita de la  
Indiana Movado de Ameriko.  
La tuto publikigita sub la titolo :  
FRATOJ EBLE NI ESTAS  
ilustris  
PHILIP RIVIERE  
tradukis et la franca kaj la angla  
PHILIPPE CHAVIGNON

©UTOVIE, 1993.

Cette version en esperanto des  
Paroles du Chef Seattle  
a été numérisés en septembre 2023

ISBN 978-2-86819-947-8

Dépôt légal 09/2023

© Editions d'Utovie, Diffusion Différente, 2023

La numérisation du fonds Utovie reçoit l'aide  
de la Région Nouvelle Aquitaine  
et de la DRAC Nouvelle Aquitaine.